

sensenca tiom longe kiom sportistoj reprezentos ŝtatojn kaj naciojn - ili devus reprezenti nur sin mem. La sento aparteni al iu grupo au komunumo - jen la unua paŝo al netoleremeco, ŝovinismo kaj aliaj malplezuraj fenomenoj. Esperanto devus resti tute senhierarkia, amorfa spaco lingva alirebla por ĉiuj.

Sed en tio aperas ĉefa malfacileco: tiel nomata statistika homo pereas preskau tuj en spaco kaj tempo senigita de hierarkio, direktoj kaj referencpunktoj; alie la individuoj, kiuj jam multajn jarojn pene laboris por disvastigi siajn imagpovon kaj konscion kaj daŭre pri tio laboras. Sed tiaj homoj estas malmultegaj. La plimulto devas havi punktojn direktodonajn: simbolojn, emblemojn, himnojn, standardojn, festotagojn, datrevenojn, estrojn, heroojn. El tio rezultas cirklo erara kaj sorĉita.

Se temas pri ia ara ilumino multe indikas ke tiu maleblas. Oni audis kaj legis nur pri iluminataj uloj, neniam pri iluminata nacio. Amaso da saĝuloj estas same stulta, malklera, agresiva, kriema kaj senpensa kiel iu alia amaso.

Do ni atentu - trodozita kuracilo povas mortigi anstataŭ sanigi; ni ne troigu, por ke ni, pro tro intensa sanigado kaj savado, ne devu enlistigi nin mem en la ruĝan libron de specioj endanĝerigitaj je malapero.

Carlos Castaneda promenis iam sur homoplena strato kun Don Juan, sia gvidisto je la pado ŝamana. Neatendite li rimarkis limakon pene rampantan trans la trotuaro. Li prenis ĝin kaj portis en arbustaron. "Kial vi faris tion?" - demandis lin mirigita Don Juan. "Ja ĉi tie iu povus tretpisti ĝin." "Kaj tie iu povas ataki ĝin kaj manĝi." Konsternita Castaneda enpensiĝis kaj respondis: "Do mi reportos ĝin ĉi tie." Kaj Don Juan: "Sed ĉi tie iu povas tretpisti ĝin... Do lasu ĝin. Senhelpa vi estas tiukaze. La limako simple malbonŝancis ke ĝi renkontis je la vojo de sia vivo Castaneda la stultulon."

Adreso de la aŭtoro: Radoslaw Nowakowski  
Dabrowna Dolna 41  
PL 26-010 Bodzentin  
POLLANDO

RECENZO:

Harald HAARMANN

### La LINGVOMONDO de EUROPO

"DIE SPRACHENWELT EUROPAS -  
*Geschichte und Zukunft der Sprachnationen zwischen Atlantik und Ural*"

Campus Verlag GmbH, Frankfurt/Main (D), 1993  
ISBN 3-593-34825-X (374 S., 15 Abb., 68.- DEM)

En antaŭa recenzo ("La serĉado pri la perfekta lingvo", Sci.Rev. 1994:45:2(165) p.46-51) estas menciita tiu ĉi libro, kiu meritas atenton en konteksto kun Esperanto antaŭ ĉio pro la fakto, ke la aŭtoro ne estas semiotikisto, sed lingvistikisto.

Komenca parto montras profundajn statistikojn pri ĉ. 75 parolitaj lingvoj en Europo kaj en Kaukasio, kie oni parolas 37 autofonajn lingvojn kaj ankoraŭ 20 aliajn, (el kiuj nur 19 havas skriblingvan normon).

Estas konate, ke en Europo ĉiu estas kulture fiksita al sia lingvo. La problemo de la "komuna europa domo" estas sekve la integrado de la lingvo-naciismo en novan kulturan identecon ("europo-ideo") baziĝonta sur la pluralismo de la naciaj lingvoj resp. lingvo-nacioj. Ĉar ŝtataj terenoj ofte estas pli vastaj ol la historiaj lingvo-terenoj de la enloĝantaj popoloj necesas protektado de tiuj lingvaj minoritatoj. Lingvo-problemoj en iu ŝtato estas ĉiam politikajo. Pro tio necesas klaraj difinoj de ĉiuj esprimoj kiuj koncernas la interrilatojn inter lingvanoj kaj socio, komunumo, popolo, nacio, ŝtato ĝis supranaciaj komunumoj. La lingvo-uzo, eĉ la oficiala, povas havi multajn aspektojn: dialekta, administrada, kanceleria, popola, nacia, ŝtata, interŝtata.

La aŭtoro elmontras multajn trafajn faktojn el la historio, ekz. la plej maljunan konatan dekretan pri protekto de landaj lingvoj en oficialaj dokumentoj ene la romia imperio. Tia agnosko signifis frua revalorigo de lokaj lingvoj je kosto de la latinlingva universaleco.

Anloga signifo havis la historia eksperimento de la frua soveta lingvoplanado sub la iniciato de Lenin kun la celo de socia egaleco. Tiam estis skribigitaj multaj ne-rusaj lingvoj kun samtempa konsolidigo de la foneta kaj morfologia sintakta baso; poste okazis modernigo per neologismoj. Oni nombris en 1989 78 skriblingvojn, la plej multaj ne skribitaj antaŭ 1917;

Internacia Scienca Asocio Esperantista

entute ekzistis en la iama multpopola ŝtato pli ol 130 lingvoj, kaj la demokrata lingvoplanado celis intence la regionigon de la lingvo-uzo.

Pli ofte okazas la kontraŭa procedo: oni dekretis la egalecon, instalas la samrangecon kaj fine la devigan unuecigon favore al nacia integreco per nacia lingvo. Ŝtata lingvo-planado kausas plej ofte enlandajn kaj eĉ naciajn konfliktojn. Ideala memkompreno ekzistas en insula ŝtato, kies popolo praktikas la saman lingvon laŭ kohera kultura modelo (Islando), sed se la nacio estas difinita kiel lingva kulturkomuneco kaj konsistas el diversaj lingvopopoloj (au gentoj), kvazau necesas nacia lingvo funkciante kiel ŝtatlingvo: rezultas la t.n. "lingvo-nacio", kiu diferenciĝas de la aliaj nacioj per nacia lingvo kiel kultura institucio - "la nacio vivas per sia lingvo".

Tamen: patruja lingvo sur patruja tero ne garantias pacon en la patrolando, se ekzistas spite al komuna lingvo (ekz. la serbokroata) gravaj entnaj au aliaj intereskonfliktoj (Bosnio).

Staras la tezo de la aŭtoro: nacionalisma fenomeno ekzistis jam longe antaŭ la ekesto de la tipaj nacio-ŝtatoj en la XVIII - XIX jarcento en la formo de lingvo-naciismo. Fonto de la naciaj movadoj estis la frua naciigo de la skribkulturo en la landaj lingvo-akademioj de la Renesanco post malapero de la latinlingva universaleco.

La eŭropa ideo havas kontraŭajn bezonojn: la lingva problemo en la "Eŭropo de la Patrolandoj" estas regulita en artikolo 217 de la t.n. Romaj Kontraktoj per difino de nacio-lingvo, ofico-lingvo, laboro-lingvo, lando-lingvo, regio-lingvo - tute alie ol ĉe la eksterlingva reguligo en EFTA (angla) au ĉe la dominantreguligo en COMECON (rusa).

En la Eŭropa Komunumo oni forlasis la principon de lingva unuecigo favore al lingva pluralismo, ĉar la necesa novkonstruigo de iu identeco kun kreata eŭropo-koncepto devos ankoraŭ longe konsideri la fakton ke lingvo, por eŭropanoj, de ĉiam signifis pli ol nur praktika interkomunikilo, kaj ke turniĝo al iu planlingva universaleco dependas de pli ol nur de komprenemo pri teknika neceso.

"Spite al ideala revalorigo ... flanke de UNESCO ... esperanto estas konsiderata de neniu internacia organizo kiel laborlingvo. Mankas al esperanto tio, kiun ĉiu natura lingvo enhavas: la simbolvaloro de *kultura identeco*, kiu estas kreskinta *historie*." -

Por informi kaj esti informita...

# LA PLEJ OFTA INTERNACIA GAZETO EN ESPERANTO

*Aperas dusemajne*

# EVENTOJ

Redakcia adreso:  
Budapest, pk. 87,  
H-1675, Hungario  
Telefona kaj telefaksa:  
(+36-1) 1288-258

Internacia Sendependa Gazeto pri la Esperanto-Movado

aperas ekde marto '92

Represo de elektitaj artikoloj el aliaj E-revuoj,  
kaj rapidaj informoj por aktivaj esperantistoj!

**EVENTOJ aperas dusemajne,  
kaj estas io alia, ol la kutimaj movadaj gazetoj...**  
Abonu kaj kunlaboru ankaŭ Vi!

H-1675 Budapest, pk. 87.